Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda


Septembro 2002 73-a jaro, n-ro 9 (1167)

ISSN 1163.0442 MENSUEL/MONATA

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr





Dum la kongreso aperis la Nova PIV !

Ĉu vi jam akiris ĝin ?

Prezo:
por Francio 70 € + 4,27 €(afranko)

por Eŭropo 70 € + 7 € (reg.afranko)


ekster Eŭropo 70 € + 9 € (reg.afr.)



SUPRE LA INTERNO KAJ SUBE LA EKSTERO DE NIA KONGRESEJO

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj, pro neatenditaj problemoj de la registraĵo de niaj laborkunsidoj en Alikanto (tro da eĥo en la amfiteatro), la detala protokolo aperos en oktobra Sennaciulo.

Kiel vi povas konstati, tiu ĉi numero estas tre varia kaj traktas multajn diversajn aferojn. Mi esperas ke ĉiu el vi trovos ion interesan.

Mi daŭre invitas vin al kunlaboro en Sennaciulo. Sendu al la redakcio aktualajn informojn pri la sociaj kaj socialaj eventoj en via regiono kaj lando. Informu niajn legantojn pri la vivo de laboristoj kaj ordinaraj homoj. Interŝanĝu spertojn kaj informojn kun la aliaj. Estus bone se vi povus ankaŭ ilustri viajn artikolojn.

Ankaŭ pensu, laŭeble, ĉi-jare venigi al SAT almenaŭ unu novan membron. Tiel nia Asocio pligrandiĝos kaj pli facile plenumos sian rolon. Dankon. Kamaradece,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 52€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

GRAVE!
Nova konto en Germanio!

Nia landa peranto, k-do Proskovec informas nin ke ŝanĝiĝis SAT-konto por la kotizoj kaj aliaj pagoj. Bonvolu do noti:

Numero : 4 907 664 100
Bankkodo : 760 260 00
NORISBANK

KAVA-PECH 

La eldonejo de nia k-do Petro Chrdle grave suferis pro inundo !

Dum la UK en Brazilo, kiun li partoprenis, gravega inundo tute detruis la kompletan librostokon de la eldonejo KAVA-PECH (apud Prago), kiu zorgis pri la presado de nia Nova PIV. La akvo rapidege alvenis kaj atingis la altecon de pli ol 2 metroj. Oni povis savi iom da informadika materialo sed la libroj estis detruitaj. La stokejo ne estis asekurita. La valoro de detruitaj libroj estas proksimume 50000 € - kaj pli ol triono de tiuj libroj estis en Esperanto aŭ pri Esperanto.

Do, tiuj gekamaradoj kiuj ŝatas Esperanto-literaturon kaj pretas helpi savi Esperanto-eldonejon KAVA-PECH, bonvolu reagi.
Jen kion interalie skribis k-do Chrdle:

«Al ĉiuj, kiuj afable helpos restarigi mian eldonejon, mi anticipe dankas. Estas klare ke mi esprimos mian dankon ankaŭ poste, interalie ĉiuj donacantoj ricevos la sciigon, kiom da mono kolektiĝis, kiu donacis (krom se iu deziros resti anonima), por apero de kiuj libroj ilia mono estis uzita (estos nur por la libroj en Esperanto aŭ pri Esperanto!).

Do, se iu el vi ŝatus kontribui (mi vere ne atendas grandajn donacojn kaj danke akceptos ankaŭ malgrandajn sumetojn), eblas plej simple pere de mia konto ĉe SAT kun indiko «por Kava-Pech» aŭ de mia konto ĉe pchr-s ĉe UEA. Eventuale ni interkonsentos pri alia eblo, ke ni ne nutru bankojn per internaciaj ĝiroj (ĉe malgrandaj sumoj ili povas eĉ superi la sendatan kvanton da mono)».

K. *Barkoviĉ (laŭ la letero de Petro sendita al kelkaj geamikoj).*


ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ
Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

OSIEK- PREMIO al k-do Barkoviĉ



Sekve al la last-momenta informo el la julia-aŭgusta Sennaciulo (p. 112):



Ni ĵus ricevis oficialan informon ke dum la lasta IEK en Loveno (Belgio) estis atribuita OSIEK premio al nia k-do Kreŝimir Barkoviĉ pro la traduko de libro «7000 tagoj en Siberio». Tiu ĉi libro estas eldonita de SAT en 1983. En tiu ĉi 496-paĝa verko, Karlo Ŝtajner, sincera komunisto fidela al sia idealo kaj konscia ke tio kio konstruiĝis en Sovetio ne estis socialismo, priskribis sian preskaŭ 20-jaran restadon en Siberia gulago.

Tiu ĉi bone tradukita verko ne devas esti forgesita kaj ĝi ne devas forgesigi ke centmilionoj da homoj suferegas kaj mortas nuntempe ne plu pro tia karikaturo de la socialismo sed sub ne malpli kruela formo, pro mafia doktrino: la ekonomia liberalismo.

Mendebla ĉe SAT.
Prezo inkluzive afrankon:

por Eŭropo :	24,47 Eŭroj
ekster Eŭropo :	26,12 Eŭroj.

Jen la oficiala informo:

Kara Kolego,

Nome de OSIEK, kun granda ĝojo mi mesaĝas ke vi ricevis la OSIEK-premion 2002 pro via traduko de «7000 TAGOJ EN SIBERIO» (de Karlo Ŝtajner).

La sekreta voĉdonado por la premio okazis la pasintan vendredon, la 26an de julio, dum la IEK (Internacia Esperanto-Konferenco) en Loveno, Belgio. Sesdeko da ĉeestantaj OSIEK-anoj partoprenis en la baloto.

Plej varmajn gratulojn.

Madeleine de Zilah
OSIEK-komitatanino pri OSIEK-premio

KROATA INFORMO PRI OSIEK - PREMIO

VJESNIK HRVATSKI POLITIČKI DNEVNIK ON-LINE

HThinet OFFICE i OFFICE SUPER PLUS paketi HThinet

HOME WWW ARHIVA PDF ARHIVA

kultura

Petak, 9. kolovoza 2002.

Barkoviću nagrada za prijevod Štajnerovih memoara

ZAGREB, 8. kolovoza - Na međunarodnoj esperantskoj konferenciji u belgijskom gradu Louvenu nagradu za najbolji esperantski prijevod publicistike dobio je zagrebački esperantist Krešimir Barković, izvijestio je u četvrtak Hrvatski savez za esperanto. Šezdeset sudionika, na konferenciji koja je održana od 20. do 26. srpnja, proglasilo je za najbolji prijevod na esperanto knjigu Karla Štajnera »7000 dana u Sibiru«, koju je u prijevodu Krešimira Barkovića izdala međunarodna esperantska organizacija Sennacia Asocio Tutmonda iz Pariza. Knjiga »7000 dana u Sibiru« Karla Štajnera (1902.-1992.) objavljena je 1971. u Zagrebu, doživjela je 24 izdanja i prodana u 760 tisuća primjeraka. Esperantsko izdanje »7000 dana u Sibiru« ilustrirao je Augusto Storani. Knjiga je opremljena zemljovidom i predgovorom o piscu te bilješkama prevoditelja Barkovića, koji trideset godina živi u Parizu. Krešimir Barković (1944.) završio je gimnaziju u Zagrebu, gdje je studirao na Medicinskom fakultetu. Esperantist je od 1966., glavni je urednik esperantskih novina Sennaciulo i glavni tajnik esperantske udruge Sennacia Asocio Tutmonda. (Hina)

Unutarnja politika
Vanjska politika
Teme dana
Gospodarstvo
Komentari
Stajališta
Kultura
Sport
Zagreb
Crna kronika
Sa svih strana
Pisma čitatelja
WWW arhiva
PDF arhiva
Na četiri kotača
Financ. tržište
Kina
Kazališta
Izložbe
Muzeji
Radio
HRT
TV (satelit)
TV (susjedi)
Putokaz
Tečajna lista
Sierra Leone
Vjesnik: 60 god.
Kosovska kriza
Tuđman 1922-99
Parlamentarni izbori
Predsjednički izbori
Dokumenti
Vaša pisma
Postavke
Pretplata
Marketing
Vjesnik tiskara
Impresum

VJESNIK d.d.

HRVATSKI POLITIČKI DNEVNIK • 10 000 Zagreb, Slavonska avenija 4 • CENTRALA: telefoni 61 66 666 ; 36 41 111 • UREDNIŠTVO: 61 61 680 i 61 61 682, telefaks 61 61 650 i 61 61 602

© Vjesnik d.d. - All Rights Reserved.

La kroata presagentejo «HINA» kaj la ĉefĵurnalo «VJESNIK» aperigis informon pri tiu OSIEK-premio (vidu supre la informon de la TTT-paĝo de «Vjesnik» de la 9-a de aŭgusto : <http://www.vjesnik.hr/html/2002/08/09/Clanak.asp?r=kul&c=6>

Jen la traduko de la teksto :


Al Barkoviĉ la premio por la traduko de memoraĵoj de Ŝtajner

Zagrebo, la 8-an de aŭgusto - Dum la internacia esperantista konferenco en belga urbo Loveno, la premion por la plej bona traduko de publikaĵo ricevis la zagreba esperantisto Kreŝimir Barkoviĉ, informis ĵaŭde Kroata Esperanto-Ligo. Sesdeko da partoprenantoj de la konferenco, kiu okazis inter la 20-a kaj 26-a de julio, proklamis la plej bonan tradukon al Esperanto, la libron de Karlo Ŝtajner, «7000 Tagoj en Siberio», kiun en la traduko de Kreŝimir Barkoviĉ eldonis internacia esperanto-asocio Sennacieca Asocio Tutmonda el Parizo. La libro «7000 tagoj en Siberio» de Karlo Ŝtajner (1902-1992) aperis en Zagrebo en 1971, havis 24 eldonojn kaj estis vendita en 760000 ekzempleroj. Esperantan eldonon de «7000 tagoj en Siberio» ilustris Augusto Storani. La libro estas ekipita per geografia karto, antaŭparolo de la aŭtoro kaj la notoj de tradukisto Kreŝimir Barkoviĉ, kiu jam de tridek jaroj vivas en Parizo. Kreŝimir Barkoviĉ (1944) finis gimnazion en Zagrebo, kie li studis en Medicina fakultato. Esperantisto de 1966, li estas ĉefredaktoro de esperantista gazeto «Sennaciulo» kaj estas ĝenerala sekretario de esperanto-asocio Sennacieca Asocio Tutmonda. (Hina)

IEK 2002 en Loveno

La internacia Esperanto-Konferenco 2002, en kiu mi partoprenis la unuan fojon, okazis inter la 20-a ĝis la 26-a de julio en la katolika universitato de Loveno (Belgio). Organizis ĝin Esperanto 3000 en Loveno. Entute partoprenis 119 personoj el 14 landoj.

La programo disvolviĝis dum la semajno inter altnivelaj prelegoj matene ĉirkaŭ la temo "Scienco kaj socio", turismaj aktivaĵoj posttagmeze kaj kultura programo vespere. Prelegoj pri: "Scienco kaj malscienco kaj ilia influo al la socio" fare de d-ro Stefaan Cottenier, "Vero kaj malvero en la asertoj pri la minacata naturo" de d-ro Wim de Smet, "La socio kaj la lingvosciencoj" de d-rino Maria Butan el Rumanio, "Diru al mi la veron kuracisto" de kuracisto Charles Lebaigue, "Kiom da socioj, tiom da sciencoj" de Eugène de Zilah (aŭtoro de la libro "Vivi sur barko"), "Filozofo kaj fundamentalismo" de Christian Declerck, instruisto pri la angla kaj franca lingvoj kaj kelkaj aliaj prelegoj.



D-ro Stefaan Cottenier dum sia prelego


Turisma programo kondukis nin al montroĝardeno en Hoegaarden, Bruselo kaj ĝia naturhistoria muzeo, Bierfarejo Interbrew (biero Stella-Artois), muzeo pri Mezafriko kaj kompreneble vizito de Loveno, kiu indas viziton, kun akcepto en la urbodomo de ĝia urbestro. Kulturaj vesperoj, folklora kaj greka, belga biergustumado kaj konstanta muziko de Floreal Martorell agrabligis la semajnon.

Vendrede matene la programo finiĝis per la oficiala kunveno de OSIEK dum kiu estis decidita pri la urbo kiu organizos la venontan IEK kaj pri ĝia temo. Ankaŭ estis demokrate elektita la ricevonto de la OSIEK-premio. Post pluraj voĉdonadoj, ĝin finfine ricevis k-do Barkoviĉ, konata sekretario de SAT pro sia traduko de "7000 tagoj en Siberio". Gratulon al li.

IEK 2002 vivis en Loveno. Nun vivu IEK 2003 en Prago.



D-rino Maria Butan (maldekstre) apud s-ino Mantha Christou, prezidantino de OSIEK, dum prelego.



Kuracisto Charles Lebaigue prelegas pri la temo: «Diru al ni la veron, kuracisto»

Teksto kaj fotoj: René Bouchet

Salutparolo de k-do Gilbert Ledon, nome de SAT, dum la U.K. en Fortalezo

«Kiel peranto en Brazilio kaj nome de Sennacieca Asocio Tutmonda, mi salutas la kongreson. Mi oportune rememorigas, ke SAT, la unua faka asocio, kies ekskluziva lingvo estas Esperanto de 1921, de 80 jaroj klopodas konstrui vere universalan, tutmondan, homaran kulturon. Ĉi tiu SAT-tutmondigo estas evidente la kontraŭo de la nuntempa tutmondigo farita de kapitalismo, bazo de sklaviga, senprecedenca homekspluatado. SAT konsciis, ke el la diverseco en nacioj, en rasoj kaj religioj, inter aliaj, elvolviĝas ne nur minacoj sed senĉesaj, malhumanaj konfliktoj. SAT ĝuste konstatis, ke la homaj valoroj estas universalaj, tiel se ni nur povas agi loke, ni devus pensi globe, ni devas kutimiĝi al eksternacia sent-, pens-kaj agad-kapablo, diras la SAT-slogano. Ĉi-kongreso, meze de ekzemplo por interplektado de homaj, civilizaciaj valoroj, estas bona okazo por tion sperti.

Mi invitas vin, lunde tagmeze, por nia aparta SAT-kunveno cele al pliaj informoj kaj deziras al vi bonan kongreson.»



LIBERECANA FRAKCIO

Raporto de la kunvenoj de la Liberecana Frakcio de SAT en la kadro de la 75-a SAT-Kongreso en Alikanto.

Kunveno de la 02-07-2002.

Je la 16a horo, k-do Jakvo Schram, bonvenigante la ĉeestantojn, malfermis la kunvenon.
Tuj li traktis la redaktadon de la frakcia bulteno «Liberecana Ligilo». Li substrekis ke la redaktado fakte estu nur kompilado de artikoloj; ne la redaktoro mem plenigu la broŝuron! Do, gekamaradoj verku!
Aludinte la artikolon de k-dino J. Lepeix en junia Sennaciulo, li esprimas la opinion ke oni ne povas silenti pri maljustecoj en la mondo.
Rilate eventualan nenecesson de propra bulteno li sugestas ke oni eble povus konsideri ĝian anstataŭon per plena paĝo en S-ulo.
Li substrekis ke la disponigo de L.L. sur interreto en PDF-formato (kiu deziras ĝin, konigu sin) ne signifos la malaperon de la broŝura L.L., kiun oni ĉiam povos aboni.
La ĉeestantoj traktis plie la agadon de la frakcio. Oni planas klopodi ke la CNT revuo aperigu artikolon por konigi SAT. Tiuj klopodoj ne nur okazu ĉe CNT, sed ankaŭ ĉe ceteraj amikaj kulturaj organizoj.
Por tiaj agadoj k-do Robert Blow, sekretario de la frakcio, volonte donos valorajn informojn kaj konsilojn.

Kunveno de la 04-07-220

Ĉi tiu kunveno celis speciale informi pri la agado de la frakcio, kaj konigi pli precize la anarki-sindikatismon al interesuloj.

Kunveno de la 06-07-2002

K-do Marteno Bustin prezentis la financan raporton. Diversaj kamaradoj pagis al li la kotizon, kiu ĉiam estas 8 eŭroj. En la kaso troviĝas 439 eŭroj. Sed oni konsideru ke ĉiu numero de Liberecana Ligilo fakte kostas 175 eŭrojn; oni do nur povas insisti por ke la abonantoj akurate pagu.
Nome de Jakvo, k-do Cavalier ree vokas al sendado de materialo por la bulteno.
Oni atentigis ankaŭ ke ĉiam kuŝas ankoraŭ stoketoj de libroj de Kropotkin, en Parizo, Berlino kaj Moskvo.
Ivo Peyraut antaŭvidis eldoni la libron «Eseoj kaj debatoj pri Proudhon». Jacqueline Lepeix pretas fari la tradukon sed atendas la rajton tion fari. Pri tio okupiĝas Juliette Ternant kaj Guy Cavalier. Kiam ili sukcesos, ni, post 2 jaroj povos voki al antaŭmendo.
K-do Peyrouty rakontis pri siaj klopodoj kontakti aliajn organizojn kaj konstatis ke foje oni devas uzi 2 lingvojn kaj ke la disa loĝado kaŭzas iujn malfacilaĵojn

protokolis:
Stella De Weerd

AFERO «PORTOS»

Karaj amikoj!
Du el la anoj de PORTOS estas kondamnitaj (vidu leteron, paĝo 118). La kasacia apelacio estas sendita al la Supera Kortumo. Estas bezonata helpo. Mi sendas leteron de PORTOS-anoj koncerne la aferon.
Nikolao Gudskov

Karaj amikoj!

Bedaŭrinde, niaj anoj ne estis liberigitaj. La procesoj daŭras - antaŭ ni estas la etapo de Supera Kortumo. Necesos ankoraŭ ioma via morala helpo - subtenaj leteroj al tiu instanco. La projekton de tia letero en Esperanto kaj la rusa lingvo vi povas vidi en apuda paĝo.

Sed nun ni estas devigataj turni nin al vi ankaŭ kun alia peto. Pli ol 1,5-jara periodo de esplorado kaj procesoj jam elĉerpis ĉiujn niajn financojn, ĉar la advokatoj postulas ja altajn honorariojn... Ni aktive perlaboras monon, sed ankaŭ por plenforte tion fari, ekzistas obstakloj: 10 el la plej aktivaj niaj membroj estas oficiale akuzataj kaj fojfoje devas sin kaŝi, kio malhelpas al ili perlabori tiom, kiom ili povus en normalaj cirkonstancoj.

Tial ni petas tiujn, kiuj kapablas iom helpi ankaŭ materie, sendi al ni iomajn monsumojn por advokatoj de niaj kamaradoj. Tion eblas fari al UEA-kontoj de niaj anoj Tamara Kostjuk (**tkos-f**) kaj Julia Privedjonnaja (**prvd-n**) aŭ al deviza konto en la rusa ŝparbanko, malfermita de Julia Privedjonnaja: IRVT US 3N 890-0057-610 Savings Bank of the Russia Federation, Mayinoroshchinskoe branch, 7981/01594, for Privedyonnaya Yuliya Anatolyevna.

Adreso de la banko: Sadovo Karetnaya 8 str. 1, RU-127006 Moskvo.
Pers. konto: 42301.8408.3805.5200.040
Korr. konto: 30101.8104.0000.0000.225
BIK: 044525225.

Ni petas pardonon pro tia peto, sed nia situacio fariĝis komplika.
Koran dankon!

Anoj de PORTOS (Poeziigita Unuiĝo por Prilaboro de Teorio de Komuna Feliĉo).
10.08.2002
<bknl-portos@yandex.ru>

Noto de k-do Gudskov: Koncerne detalojn pri la subtena letero al Supera Kortumo oni turnu sin al mi (ekz., se la leteron sendos virino, la rusan tekston necesos korekti gramatike, ktp.).

Nikolao

AFERO PORTOS - grave kaj urĝe -

Ĉi sube vi trovas modelon de letero sendenda al la Supera Kortumo de Rusia Federacio subtene al niaj kondamnitaj kamaradinoj

Al Kolegio pri krimaferoj de
Supera Kortumo de Rusia Federacio
Iljinka 7/3, Moskvo, RU-103289
Rusio

Estimataj juĝistoj!

La 24-an de julio 2002 en Kortumo de Moskva regiono federala juĝisto s-ino Snegiriova anoncis la verdikton pri Irina Derguzova kaj Tatjana Lomakina, apartenantaj al la organizo PORTOS – Poeziigita Unuiĝo pri Prilaboro de la Teorio de Komuna Feliĉo (krimafero n-ro 2-75-56/2002): 8 jaroj en prizono por I. Derguzova kaj 6 jaroj en prizono por T. Lomakina. Nun la kasacia pledo por abolo de la verdikto troviĝas en la Supera Kortumo, kaj mi esperas, ke la verdikto estos abolita.

Mi certas, ke temas pri juĝeraro pro pluraj rompoj de la Krimprocesa Kodo, ĉar tiuj knabinoj estas membroj de la asocio, al kiu mi mem apartenas, kaj mi havis la eblecon senpere konatiĝi kun ili kaj ilia agado. Nia organizo – SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) – estas asocio, unuiganta laboristojn, reprezentantojn de diversaj tendencoj de la laborista movado el dekoj da landoj de la mondo, uzantaj en sia agado la internacian lingvon Esperanto. En la jaro 2000 kongreso de SAT okazis en Moskvo, kaj membroj de PORTOS helpis ĝin organizi (renkontis kongresanojn en la flughaveno, disponigis buson por ekskursoj ktp.), kaj rakontis pri siaj celoj kaj agado.

Mi certas, ke la celoj kaj agado de PORTOS, kiuj fariĝis la bazo de la akuzo, neniel povas esti kaŭzo por tiom severa verdikto, egala al verdikto kontraŭ murdistoj. La anoj de la organizo povis fari erarojn, sed neniel – krimojn. Tion, kiel mi scias, konfirmis la juĝesploro, dum kiu neniu el pli ol 50 atestantoj subtenis la akuzon.

Mi esperas, ke la Supera Kortumo rapide kaj juste esploros la aferon, abolos la verdikton kaj liberigos niajn kamaradinojn.

Dato, Subskribo
Nomo, familia nomo
Adreso

Судебная коллегия по уголовным делам
Верховного Суда РФ,
Ильинка 7/3, Москва, 103289
Россия

Уважаемые судьи!

24 июля 2002 г. суд присяжных Московского областного суда под председательством судьи Снегирёвой приговорил Ирину Дергузову и Татьяну Ломакину, принадлежащих к организации ПОРТОС – Поэтизированное Объединение по Разработке Теории Общенародного Счастья (уголовное дело № 2-75-56/2002): И. Дегрузову к 8 годам, а Т. Ломакину – к 6-ти годам заключения. Сейчас кассационная жалоба с просьбой об отмене приговора находится в Верховном Суде, и я надеюсь, что приговор будет отменён.

Я уверен, что речь идёт о судебной ошибке, вызванной многочисленными нарушениями Уголовно-процессуального кодекса, поскольку эти девушки являются членами ассоциации, к которой отношусь и я сам, и я имел возможность непосредственно познакомиться с ними и с их деятельностью. Наша организация – САТ (Всемирная Вненациональная Ассоциация) – это ассоциация, объединяющая представителей различных тенденций в рабочем движении их десятков стран мира, использующих в своей деятельности международный язык Эсперанто. В 2000 г. конгресс САТ происходил в Москве, и члены ПОРТОСа помогали его организовать (встречали делегатов в аэропорту, предоставили автобусы для экскурсий и т.п.), и рассказывали о своих целях и деятельности.

Я уверен, что цели и деятельность ПОРТОСа, ставшие основой обвинения, никак не могут служить причиной столь сурового приговора, равного приговору за убийство. Члены организации могли делать ошибки, но никак не совершали преступлений. Это, как я знаю, подтвердило и судебное следствие, в течение которого никто из более 50-ти свидетелей не поддержал обвинение.

Я надеюсь, что Верховный Суд быстро и справедливо изучит это дело, отменит приговор и освободит наших товарищей.

Дата, подпись
Имя, фамилия
Адрес

SENNACIISTA FRAKCIO

Pledo por libereca sennaciismo

La komunismo ne estas la kreaĵo de Marks, Engels, aŭ Lenin, ankoraŭ malpli ilia privata posedaĵo. Ĝis nuntempe, ekzistas diversaj komunismaj grupoj, kiuj tute ne aliĝas al la konceptoj de Lenin, kelkaj eĉ diferenciĝas de Marks[1]. Oni povas la samon diri pri Proudhon kaj la anarkiistoj. Fakte, pli ĝenerale, ne ekzistas posedrajto je ĉiuj vastaj sociaj movadoj, la mondkonceptoj.

En la Komunista Manifesto, Marks kaj Engels skribas ke « la komunismo (..) forigos la religion… ». Kvankam komunisto - libereca - mi ne konsentas kun tiu komunismo, kiu finiĝas per Stalin kaj Pol-Pot. Religio estas homa asocio kiu rajtas ekzisti, sed ĉiu homo devas havi la rajton aliĝi - aŭ ne - al tia aŭ tia alia religio, laŭplaĉe.

Same, en la Sennaciisma Manifesto Lanti skribas, ke "la sennaciistoj batalas kontraŭ ĉio nacieca : kontraŭ naciaj lingvoj kaj kulturoj, naciaj kutimoj kaj tradicioj". Kiel libereca sennaciisto mi ne povas konsenti.

Anekse de sia fama manifesto, Lanti difinas la sennaciismon, doktrinon kies celo estas "la malapero de ĉiuj naciismoj rigardataj kiel suverenaj unuoj, la racia utiligado de ĉia materialo kaj energio profite al ĉiuj homoj, unuecigo de ĉiuj mezuriloj kaj kalkuliloj, kaj uzado de Esperanto kiel sola kulturlingvo". Tamen, la malapero de ĉiuj naciismoj rigardataj kiel "suverenaj unuoj", ne signifas la forigon de la nacioj rigardataj kiel privataj asocioj, laŭ la senco donita de la aŭstro-marksisma skolo.

Karl Renner la unua montras al ni ke tiuj ambaŭ realaĵoj, ŝtato kaj nacio, «neniam tute koincidas», kiom ili estas «kontraŭaj», samkiel ŝtato kaj socio ĝenerale. La ŝtato estas teritoria aŭtoritato jureca, la socio, «asocio de personoj fakte». Renner montras ke, la moderna naci-ŝtato starigas la jakobenan diktaturon, la teritorian principon : se ci loĝas sur mia teritorio, ci estas submetita al mia aŭtoritato, al mia juro, al mia lingvo[2] . Dudek jarojn poste, en 1918, en la preciza momento kiam la multnacia Aŭstro-Hungario dissplitiĝas, Karl Renner proponas disigi la ŝtaton de la nacioj, konsistigante tiujn lastajn kiel asociojn jure[3]. Iom pli poste, en 1923, la grafo Coudenhove-Kalergi sekvas la saman vojon, skribante : «Ĉiu civilizita homo devas labori por ke la nacio fariĝu morgaŭ por ĉiu privata afero, kiel la religio estas hodiaŭ. La venonta disigo de la nacio - kultura ento - kaj de la ŝtato - politika ento - havos ideologian signifon tiom grandan kiom la disigo de la eklezio kaj de la ŝtato»[4].

Jen la tradicio, kiun la sennaciistoj devas revivigi. Vera libereculo, ne intencu perforte aboli, forigi iun ajn homan ideologion, ismon, sed devas nur postuli por si kaj ĉiuj aliaj homaj estuloj la rajton aliĝi aŭ ne. En La Universalismo mi skribas : « La rajto je memdetermino, antaŭ ol esti nacia, estu individua » (esperanta eld. p. 124, franca p. 119). En Nagykanizsa, kunveninta marĝene de la 74a SAT-kongreso, nia sennaciista frakcio aprobis tekston en kiu, notinde, estis asertita ke « ĉiu homo rajtas sin determini, kiel ajn li volas : ĉu religie (kristano, judo, islamano, homaranisto, ktp), (..) ĉu etne (cigano, kurdo, ĉerkeso, flandro) (..) ĉu politike (komunisto, anarkiisto), ĉu eĉ nacie (franco, germano…) tiuj, kiuj sin determinas sennaciistoj, ĉie kaj senlace agas cele al homaro emancipita kaj frateca »[5]. Tiu homaro emancipita kaj frateca, kiun ni celu, kun respondecaj civitanoj, devos esti, kompreneble, sennacieca kaj libereca laŭ la senco supre menciita, t.e. fundamente tolerema.

Djémil KESSOUS

1 Ekde la 1840aj jaroj, oni povas renkonti en Parizo multajn komunismajn «sektojn». Estus malfacile diri, el kio konsistas la nuancoj, kiuj ilin dividas. Oni citas tamen : egalistoj, fratistoj, humanistoj, unuiĝistoj, komunejanoj aŭ ikaranoj, komunistoj, komunecistoj, komunejistoj kaj raciistoj » skribas Louis Reybaud (« Des idées et des sectes communistes », en Revue des Deux Mondes, julio 1842. Tiu citaĵo estas reproduktita de Alexandrian en lia bonega verko : Le socialisme romantique, Seuil, Paris, 1979, p. 278).

2 Karl Renner, Staat und Nation, Vieno, 1899.

3 Sama aŭtoro, Das Selbstbestimmungsrecht der Nationen, Leipzig kaj Vieno, 1918.

4 Richard Nicolaus Coudenhove-Kalergi, Pan-Europa, Wien, Pan-Europa-verlag, 1923.

5 La teksto aperis poste en la revuo Laŭte, n° 155, septembro 2001.

...pri anarkiistoj kaj A.I.

Reago al artikolo de Jacqueline Lépeix

La logiko de Jacqueline Lépeix ĉiam mirigis min:
homo, anarkiisto aŭ ne, promesas neniun respekti, kolektante subskribojn, krom kompreneble, se tion li faras pere de pistolo, ponardo, ĉantaĝo k.s. Nur tiu, kiu subskribas, devigas sin al tio, kion li subskribis...


Kaj parolante pri kolekto de subskriboj, J.L. certe aŭdis pri juna virino el Niĝerio, Safya HUSSEINI, kiu estas mortkondamnita pro tio ke ŝi naskis infanon ekster geedzeco. La islamista leĝo kondamnis ŝin al morto, per ĵeto de ŝtonoj. Kolekto de subskriboj okazas por provi elsavi tiun virinon. Ja certe J.L. kaj Amnestio I. (almenaŭ, la grupo kies sekretario ŝi estas) kontraŭbatalos tiun kolektadon, kiu (honte!) ne defendas la rajton de homoj praktiki libere sian religion...

Serge SIRE, 32412

Precizigo:

Nia Sennaciulo, majo 2002 informis sur la paĝo 76 pri la brazilaj «Sen Teruloj». La tragedio vere ekzistis. Ĝi estas tikla kaj aktuala problemo en nia lando, kaj grava problemo eĉ en nia ŝtato Paranao. Tamen, la murdoj en Eldorado de Carajas ne okazis en ŝtato Paranao, sed en norda brazila ŝtato Parao, 3000 km for de Paranao. Laŭ la presinformoj, la policanoj kiuj partoprenis en tiu agado estis kondamnitaj.

G. Drucker



Ni legis por vi....

Roland J. GLOSSOP

Monda federacio ?

Nia k-do Djemil Kessous tre atente legis kaj analizas tiun ĉi valoran verkon. Jen do lia recenzo.

Tia estas la titolo de la verko de la usonano, kaj federisto, Ronald Glossop, origine angla (World Federation, McFarland & Company, 1993), nun esperantigita de Johano Rapley. La aŭtoro estas profesoro pri pacostudoj ĉe la Sud-Ilinojsa Universitato en Edwardsvilo (S.I.U.E.). Li estas ankaŭ esperantisto. Tion indas noti en la momento kiam la mondfederista movado (World Federalist Movement [WFM]) ĵus voĉdonis rezolucion favore al Esperanto, okaze de sia 24a tutmonda kongreso (Londono, 11a/15a de julio 2002). Indas ankoraŭ saluti la konsiderindan laboron de tradukado, kiun plenumis Johano Rapley, disponigante tiun verkon al nia kara Esperantio.

Materie, la libro estas impresa : 356 paĝoj binditaj sub forta verda kovrilo, kun notoj, indekso, bibliografio... kaj idee la enhavo estas laŭmezure. La aŭtoro liveras al ni, kiel anoncita per la subtitolo de la esperantista eldono, ampleksan analizon de federacia mondregistaro, cetere ne nur ampleksa, sed ankaŭ sistema.

Resumo

En la unuaj ĉapitroj estas difinitaj la bazaj juraj konceptoj : registaro, demokratio, federacio... kaj, poste, farita tre trafa studo de la rilatoj inter la diversaj juroj (natura, internacia, tutmonda) kaj la registaro. Tiam, R. Glossop, raportas la ĉefajn argumentojn favore al federacia mondregistaro, la unuan : la bezonon transiri de la nuna stato de senĉesa milito al tutmonda demokratio, kaj la sekvajn, kiuj respondas al diversaj aliaj necesecoj : estri la tutgloban ekonomion, eviti ekologiajn katastrofojn, leĝdoni pri la regionoj situantaj ekster la rego de landaj registaroj, subteni kaj prosperigi senton de monda komunumeco, ktp.

Poste, tre pacience, la aŭtoro elnomas kaj ekzamenas ĉiujn argumentojn starigitajn kontraŭ tiu projekto. Unue, la provo krei federacian mondregistaron kaj tiucele senarmigi naciojn, povus paradokse konduki al milito, eĉ nuklea (laŭ Gregory Kavka). Svislando, kiel Usono, spertis tiun problemon. Laŭ aliaj aŭtoroj mondfederismo premas por pli da centrigo dum la nuna direkto de ŝanĝo estas la malcentrigado : « Disdividi, ne pligrandigi, estas la solvo » (Kirkpatrick Sale). Laŭ tiuj kontraŭfederistoj, la nuna organizo de la Unuiĝintaj Nacioj (UNo), pli proksima al la koncepto de konfederacio, estus la malplej malbona solvo.

En la sekva ĉapitro, R. Glossop refutas ĉiujn ĉi argumentojn, laŭvice. Notinde, koncerne la unuan obĵeton, li elmontras ke, precize, la militoj interne de Svislando ĉesis ekde kiam tiu lando transpasis de l'konfederacia al la federacia stato (en 1847). Krome, « estas eraro kredi, ke la starigo de federacia mondregistaro estus kontraŭa al la malcentrigo, kiun deziras iuj etnaj grupoj », ĉar « federacio ne estas oponanto de naciismo sed estas formulo por la konservado de naciecoj sen militoj kaj sen luktoj por potenco », kaj li citas tuj poste Peter Ustinov (prezidanto de la movado por mondfederismo) : « La federismo disponigas la maŝinaron per kiu ni povu ĝui la diferencojn kiuj ekzistas inter ni » (p. 198/199).

La aŭtoro finas sian verkon ekzamenante la diversajn eblecojn transiri al tiu mondregistaro, unue sekve de la transformo de la Unuiĝinta Naciaro (UN) en tiun federacion, sed ankaŭ pere de regiona federiĝo (kiu konsistigus « originan kernon ») aŭ ankoraŭ per la agado de ne-registaraj organizoj (NRO).

Komentoj

Jen grava verko, kiun ĉiu civitano, zorganta pri la estonto de l'homaro, devas legi. La aŭtoro primajstras sian temon. Tio ne estas hazardo ĉar li devenas de Usono, lando kun riĉa federa tradicio. Tamen, tiu libro, vera fonto de pensadoj, de referencoj, provokas kelkajn komentojn... feliĉe.

R. Glossop ŝajnas realigi translacion geometrian, meĥanikan, ŝovante, al la tutmonda nivelo, socipolitikajn strukturojn, kiuj jam estis realigitaj en kelkaj okcidentaj regionoj, notinde en Usono. Laŭ li : « Mondfederistoj ne proponas la kreon de ia ajn mondregistaro. Ili proponas la starigon de okcidentstila demokrata mondregistaro » (p. 177).

Kvankam ni neniel neas la konsiderindajn progresojn faritajn sur la vojo de la homa emancipado far la Okcidento, ĉu ties kompleksega - burĝa - demokratio estas modelo nepreterpasebla ? La perspektivoj de lingvo (p. 121), de monvaluto (p. 238) kaj de konstitucio (p. 254) mondaj, kiujn li skizas, estas allogaj ; tamen ŝajnas al ni diskutindaj (en la bona senco de tiu termino) liaj sintenoj rilate al duĉambra monda parlamento (p. 210), al tutmonda policaro kvaronigita en distingeblajn korpusojn (p. 212)... La historio kaj herooj mondaj, pri kiuj li sugestas la studon en la lernejoj (p. 121), fakte jam ekzistas ĉar nia historio, ekde ties malproksima origino, estas ja universala. Ĉu tiu tutgloba naciismo, tiu « hompatriotismo » (p. 122), ornamita per monda himno, kiun li rekomen-

das, reale efektiviĝos ? La individua rajto je memdetermino, ĉiaspeca (religia, etna, asocia, nacia, ktp…), kiun agnoskis la sennaciista frakcio de SAT en Nagykanizsa (vidu la revuon Laŭte, n° 155, septembro 2001, p. 47) ŝajnas al ni ege pli signifriĉa : mi estas homo... jes ja, kaj poste ?

La aŭtoro prave asertas, ke la principo de subdelegado (tiel tradukita, ni preferas la vorton subsidiareco, nun tutmonde uzata kvankam ne PIVa), kiu « celas ke problemoj estu traktataj ĉe la plej malalta praktika nivelo » estas « unu el la fundamentaj principoj de la federacia sistemo » (p. 213) : la subsidiareco estos verŝajne la ŝlosilprincipo de la morgaŭa socia organizo. Sed, kvankam li certigas, ke lia sistemo ne estas formale « kontraŭa al la malcentrigo » (p. 198), en kelkaj lokoj (p. 151, 154, 238...) li ŝajnas antaŭvidi pli-malpli eksplicite centralizitajn instituciojn : « La mondfederistoj, skribas li, deziras centrigitan povon de decidofarado por devigi ĉi tiun "tutgloban konscion" al ĉiu, ĉie en la mondo » (p. 161). Sed la tuta nuntempa emo, notinde kun Interreto kaj ties praktikaj aplikoj, celas al la plej ampleksa malcentrigado. Ĉu la venonta tutmonda sistemo, kiun ni esperu, estos tute simila, kiel simpla reflekto, al iu nuntempa naciŝtato, eĉ kun federaj strukturoj ? Jen la demando... Unu lasta, finfine, kiu ne estas la malplej grava. Ĉu la mondaj ĉefroluloj : naciismaj gvidantoj (inkluzive de la «dolĉaj»), kapitalistoj kaj aliaj feŭduloj, ĉiuj intimaj aliancanoj, lasos tiun demokratian projekton efektiviĝi ? Eĉ sine de la popoloj, multnombraj estas la oponantoj al la federisma idealo. Oni povas tamen imagi, ke, iun tagon, kiun ni esperu proksima, la tuja neceseco – ekonomia krizo, sociaj bataloj – kondukos nin, tiucele, al decidigaj mezuroj. Pli ol iam ajn, la kontraŭsuverenistoj ĉiatendencaj, devas lerni kiel kooperi por sin aŭskultigi.

Konkludo

La nuna historia movado estas ege kontraŭeca, kun tiuj samtempaj fenomenoj de tutmondiĝo, ĉefa temo de tiu libro, kaj aliflanke de personiĝo, de respekto, protekto al la individuo, kiun R. Glossop tamen ne forgesas (p. 291, ankaŭ p. 304 por la ĝisdatigo). Pro siaj alproksimiĝoj historia kaj jura, pro la riĉeco de la mondcivitana kulturo, kiun ĝi enhavas, tiu verko estas nemalhavebla por ĉiu homo, kiu volas esti instruata de la nuntempaj politikaj problemoj kaj celas partopreni en tiu pasiiga movado. La socipolitikaj strukturoj de la venonta homaro estas elpensendaj, inventendaj. Tiu libro prezentas gravan kontribuon al la debato.

Djémil KESSOUS

El la kara (sovetia) Infaneco

Lena Karpunina : «La Bato»
Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno 2000.
Mendebla ĉe F.E.L.

Sur bona papero en eleganta volumeto profesikvalite eldonita de Flandra-Esperanto-Ligo, digna posteulo de Stafeto, kuŝas 15 rakontoj de eksrussovetia aŭtorino. Dekkvin rakontoj, kies ĉefa fono estas la ĉiutaga vivo en soveta Taĝikio, lando, kie kreskis la aŭtorino.

Temas ĉefe pri aŭtobiografiaj rakontoj. Du rakontoj, « La persekuto « kaj « Miŝka Voropajev « temas pri punlaboraj malliberuloj kaj ne rekte rilatas kun la vivsperto de la aŭtorino. Tamen tute ne senteblas, ke estas fikcio, sed la influo de koncentreja literaturo, precipe de Varlam Ŝalamov, tute okulfrapas.

« Mortpafitaj pomoj « temas pri feria reveno en militantan landon. Multe pli novtonaj kaj pli kortuŝaj estis al mi la ĉiutagaĵoj. Ni malofte aŭdis pri la kadro de normala, ĉiutaga sovetia vivo. En la soveta Taĝikio de la sepdekaj jaroj gepatroj ofte batas infanojn, por ke ili obeu, ofte nejuste (La bato; La patrino kaj la filino). Oni frandas la malmultajn konsum-objektojn (La motorciklo), oni ekskursas en grandiozan montaron, kies loĝantoj vivas en tradicia helpema socio (En la montaro). Oni flegas proksimajn rilatojn kaj kverelas kun najbaroj (Inter najbaroj) kaj memoras konatojn el la lernejo (la Instruistino), kiuj malaperis eĉ elmigris (Bela) oni eĉ troe drinkas (Jaŝa). Kompreneble estas ankaŭ esperantista vivo (Anakondo). Religio duonmalpermesita, kuŝas rande (Paska pluvo).Tiu universo memorigas min grandparte pri la kvindekaj jaroj ĉe ni. Eble, ĉar estas rememoroj el la infaneco, sed ĉefe pro la psiĥologia proksimeco de la roluloj. La homoj en samaj kondiĉoj reagas ja tutmonde same.

La lingvaĵo estas klara, glata esperanto. Mi ne kontrolis, ĉu ĉiu vorto estas uzata en PIVa senco nek riproĉos skribi la ĝentilecan Vi per majusklo, sed ĉio estas bone komprenebla en tre klara stilo.

Jen rakontoj, kiuj tute enskribiĝas en la rusan realisman rakonttradicion de Ĉeĥov al Jurij Kazakov. Lingve kaj humanece ili estas legindaj kaj tute samnivelaj kiel bonaj nacilingvaj verkoj. Ni esperantistoj pli bone farus malkovrante tiajn talentajn originalajn aŭtorojn ol amase aĉetante la liston de Zamenhofaj Objektoj.

Robert PONTNAU

Kunlaboru kaj varbu al SAT! Subtenu vian Asocion !

57a Sat-Amikara Kongreso en Vigy (Mosela)

De la 30a de marto ĝis la 1a de aprilo, ni estis en Loreno, la lando de Raymond Schwartz, fama verkisto,



Dum la kuvena prezento de la asocio ATTAC

fama kanzonisto. La vilaĝon Vigy inter Metz kaj Thionville, ni imagis ĉirkaŭitan de uzinoj. Tute surprizitaj, ni vidis, antaŭ la kongresejo, verdan pejzaĝon. Printempaj arbaroj donas multajn verdnuancojn. La elekto de la centro de ADEPPA (Departementa Asocio por Popola Edukado kaj Plenaera Vivo) estas sukcesa, ne nur dank'al la panoramo sed ankaŭ pro la instalo de la konstruaĵoj kiuj taŭgas por kongreso. La grandaj salonoj kaj la pli malgrandaj, la vasta restoracio, la individuaj ĉambroj, kunigitaj unu al la alia, faciligis la vivon de la 150 gekongresantoj. Ĉar 25 gejunuloj de JEFO kongresis proksime de ni.

Ni ne kongresas por manĝi sed kiam la nutraĵo estas bongusta kaj sufiĉa, kiam la personaro estas servopreta kaj afabla, ni ne plendas. Kaj kiam la suno montras sin du tagojn sur tri, kion vi volas pli?

La programo de prelegoj povis kontentigi ĉies gustojn : pri Ekoturismo (Petro Chrdle, Ĉeĥio), pri uzo de Esperanto en Komputiko (André Grossmann) kaj Interreto (Bruno Masala), pri Uneska Kampanjo (Armand Hubert), pri ATTAC (Asocio por impostado super la financaj transakcioj por helpi al la civitanoj), Catherine Roux, la prelegantino verkis broŝuron pri tiu temo.
(rcathe4213@wanadoo.fr).

Raymond Schwartz havis lokon en la programo de la prelegoj. Eksterordinara estas Georges Kersaudy kiu per sia prelego pri historio de eŭropaj lingvoj konkeris la publikon. Li konas pli ol 50 lingvojn, ja diversgrade.

La Amikeca Reto (vojaĝservo de SAT), prezentis kaj vendis sian novan adresaron de la jaroj 2002-2003 (400 adresoj en 54 landoj; akirebla ĉe AMIKECA RETO 88, rue Victor Hugo FR-37400-AMBOISE <a.reto@france-association.com> <http://www.creaweb.fr/a.reto>).

La Filatela Servo de SAT havis sian budon sub prizorgado de Modesto Ramelli. Neesperantistaj organizoj estis ankaŭ invititaj prezenti budojn: Amnestio Internacia, Artisans du Monde (metiistoj de la mondo, por komerco inter Nordo kaj Sudo), ATTAC, Confédération Paysanne (progresema kamparana sindikato).

La programo de spektakloj konsistis el kanzonoj en pluraj lingvoj, inter kiuj Esperanto, de la duopo



Stéphanie Henry dum la kongreso

«Mannijo» (Manfred kaj Jo, prononci manijho) kaj de Ĵak Le Puil, konata en la Esperanto-medio.

Piedpromenadojn, ekskursojn ni ne profitis. Ĉar la laborkunsidoj, la renkontoj kun la malnovaj kaj novaj geamikoj, la vizito de la enhavoriĉa libroservo plenigis la tri tagojn. Ni ne bedaŭras tion ĉar estas ĉefe pro tio ke ni kongresas?

Kiel kutime dum la SAT-amikaraj kongresoj, la etoso estas amika. Tio ne malpermesas vigle interŝanĝi malsamajn vidpunktojn dum la laborkongresoj.

Grava informo ĝojigis la kongresantojn: la nova sidejo en Parizo estas malfermita ĉiusemajne de la mardo ĝis la sabato, posttagmeze.

Ni deziras danki la OKKanojn kiuj montriĝis efikaj kaj ebligis fruktodonan kaj agrablan 57an SAT - Amikaran Kongreson.

Anna kaj Rajmondo Raurich

Esperanto kaj «alternativaj tutmondistoj»

Estas agrable legi, ke aliaj homoj estas ĝenataj de la politika establo, kiu senpripense akceptas aranĝon, laŭ kiu en niaj universitatoj kaj altlernejoj instruado okazos en la angla. Kiel sekretario de la Ĝ.K. de Sennacieca Asocio Tutmonda, mi certe ne malhumile parolas pri aliaj homoj. Tamen kiel esperantisto ni de tempo sentas nin alispecaj en nia batalo, ke lingvo estas rajto.

En la «Universala deklaracio pri Homaj Rajtoj», oni klare parolas pri individuaj rajtoj. Fundamenta individua rajto estas la rajto uzadi la denaskan lingvon. Paroladi, uzi kaj esti respektata uzante denaskan lingvon, ne estas ligita al la politika koncepto, nacio, dekstro aŭ maldekstro, sed estas tutsimple fundamenta rajto de la individuo.

Belgio havas multjaran sperton pri lingvobatalo. Ne nur la rajto paroli sian lingvon, sed ankaŭ esti respektata, uzante propran lingvon. La juna Belgio devis atendi Emille Vandervelde, nederlandlingvanon kaj tre eminentan socialiston, kiu en 1889 enkondukis leĝprojekton en la ĉambro, ke oni akceptu la socialistan programon: « Egaleco de ĉiuj lingvoj, kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj»! Ĉi tiu ideo kaj lukto por la balotrajto por ĉiuj, estas gravaj batalkampoj por la nova BWP kaj laŭ mi la sola bazo por diskutado pri lingvo kaj ĝia uzado. La katolikoj voĉdonis kontraŭ, ĉar jam tiam ilia lukto estis pli naciema ol pure lingva.

La nuna multlingva Eŭropo devus lerni, el la historio, lecionon. La ideo de Emille Vandervelde «Egaleco de ĉiuj lingvoj», certe ne estus malbona ideo nun en Europa Unio? Certe ĝi ne povas funkcii en absoluta formo, sed per la alpreno de neŭtrala lingvo almenaŭ relative.

Germana socialista gvidanto Wilhelm Liebknecht, kun Bebel unu el fondintoj de la germana Sozialdemokratische Arbeiterpartei SDPA, 1869 poste Sozialdemokratische Partei Deutschlands SPD, dum vizito al Gento (flandra urbo) en 1877 atentigis ke lingva malegaleco estis parto de ekonomia diskriminacio. Lingvo batalo estis en la 19a kaj 20a jarcentoj pli ligita al klasbatalo ol nun. Evidente, klasbatalo tiam, estis pli loka okazaĵo. Mondaj klasbatalaj movadoj kiel nun ne ekzistis. Eĉ la Oktobra revolucio ne havis la saman historian efikon kiel nun la movado de 'alternativaj tutmondistoj». La estro tiam havis vizaĝon. Unu persono estis estro, kie nun konsilantaro sendas reprezentanton kiu, ĝenerale, parolas la lingvon de la laboristo (kvankam ankaŭ tio estas relativa).

Ke la lingva batalo en nuna tempo rapide estas metata sub negativan lumĵetilon, grandparte ŝuldiĝas ekstrem-naciismaj kaj ektrem-dekstraj grupoj, kiuj faris de la lingvobatalo parti-politikan lukton. Kiam oni tamen faras la penon informiĝi ĉe AMSAB (Instituto pri Sociala Historio) en Antverpeno aŭ Gento, oni konstatas ke lingvo en la sociala movado ludis gravan rolon. Propra lingvo estis konsiderata rajto, kiu devas esti respektata. Lingvo, kiel koncepto, neniam povas esti preteksto por propagandi naciismon, do certe ne donas kaŭzon por fari rasisman retorikon. Lingvo ne levas nin al pli alta nivelo kaj ankaŭ neniam povas esti altrudata al ni.

Radio, televido kaj certe interreto malgrandigis la mondon. Kiam prezidanto de eta ŝtato furzas, laboristo el Eŭropo povas, metafore dirite, tuj aŭdi tion per sia portebla komputilo. La mondo reduktiĝis ĝis vilaĝeto kaj tamen restas problemoj: riĉa - malriĉa, nordo - sudo.

Ni vivas en politika sistemo kiu permesas ke nur malgranda parto de la mondloĝantaro vivu en prospero.

Ĉiuj, kiuj volas dediĉi intereson, povas scii la ciferojn pri mizero kaj malriĉeco, pri malsato kaj, plej malbone, pri milito. La riĉulo ne kontentas ekspluatadi la, kiel oni nomas ĝin, 3an mondon. Ne, la humiligo estas eĉ pli ekstrema. Ekzistas absolute neniu respekto por la lingvo de tiuj popoloj.

La eta Belgio francigis Kongolon. Hodiaŭa Belgio devas adaptiĝi al la hegomonio de la nova latino, la angla. La demando ĉu vi volas, oni eĉ ne plu faras. Ne, la angla estas altrudata preskaŭ perforte, kaj kiu protestas ricevas algluitan etikedon de maltoleremo aŭ stulteco.

Ne plu sufiĉas ke laboristo laboregas por la estro. Ne, li devas akcepti ke la estro parolas la anglan. Vi ja devas adaptiĝi kaj agi mondece, ĉu ne. Al tio ekzistas nur unu (angla)respondo: 'Bullŝit'

Estas la rajto de ĉiuj, ke oni respektu ŝian aŭ lian lingvon. Necesas trovi demokratan alternativon, por solvi la lingvoproblemon en monda dialogo.

Kial grandaj kaj potencaj lingvoj devas ricevi pli da rajtoj ol malgrandaj lingvoj? Kial terkulturisto el Brazilio devas kapabli la anglan por defendi sian ĉiutagan panon? Kial memevidentas ke eĉ alternativaj tutmondistoj, kiujn ni konsideru progresema homamaso, dialogu uzante unu de la potencaj lingvoj. Kial, demandas al si esperantisto, oni neniam pensis pri politike neŭtrala lingvo?

Mi povas kompreni ke, de la flanko de la politiko, ne ekzistas intereso por Esperanto. Estas historia fakto ke politikistoj ĉiam lekas la kalkanojn de la potenculoj, en la nuna tempo Usono. Kie komence de la 20a la franca estis la potenco, ĝi nun troviĝas ĉe la angla. Voĉon de la simpla popolo oni neniam petis. Pri ĉi tiu temo oni neniam faris demokratian debaton. Plej verŝajne, la regantoj de unuopaj landoj ne nepre ĉie volas, ke pli da homoj pli intime rilatu kun samsortanoj en aliaj landoj kaj ili ŝatas mem domini la amaskomunikilojn, kiujn la laboristoj kaj simplaj homoj en «iliaj» landoj uzas.

Eĉ en la 21a jarcento, gefiloj de laboristoj malantaŭrangas kiam temas pri universitata studo. Universitataj studoj jam ne estas memevidentaj kiam oni prezentas la prezon. Kaj nun la politiko decidis konstrui plian baron. Gefiloj devas rapide lerni fremdan lingvon por ke ili povu studi ĉe universitato aŭ altlernejo. Kia humiligo, kia absoluta malrespekto. Sed antaŭ ĉio, kia stulteco de la politikistoj.

Laŭ studoj, migrantoj bezonas 3 generaciojn por adaptiĝi al la «nova lingvo» de la lando. Studentoj en Europo devus alproprigi al si dum kelkaj jaroj fremdan lingvon por ke ili povu studi. Ĉi tiu lasta jam estas peza tasko, kial plipezigi ĝin?

Ĉu temas pri nescio, malvolo, stulteco aŭ tutsimple pri orgojlo de niaj ministroj?

Mia espero estas ke, la nova movado de «alternativaj tutmondistoj», ne aliĝos al la potenco kaj submetiĝos al la lingva imperiismo de hodiaŭ. Mi estas kiel elokventa esperantoparolanto la viva ekzemplo pri la ebleco de alternativo.

Eblas pruvi ke interpretistoj bezonas nur unu jaron, por ke ili parolu kaj apliku la lingvon en la medio de la laboro.

Simpla laboristo, kaj nun mi troviĝas sur propra tereno, povas en kelkaj jaroj lerni kaj uzi la lingvon. Post unujara studo, mi jam kapablis paroli kun virino el Ĉinio pri politiko, kun brazilano pri perforto kaj rasismo en Brazilio kaj kun hungaro pri la komunismo en la orienta bloko.

Fino : sekvanta paĝo

Nikolao Entelis

"HUMANISTOJ-MILITISTOJ"

"Venas tempo lerni ami la neŭtronan bombon". El la deklaro de Garold Arnju, ĉefa specialisto pri nukleaj armiloj de la Ministerio de Usona landdefendo

Ĉu vi ĝ
+in aŭdas - transmaran parolon allogan?
Oni denove reklamas la bombon neŭtronan :
- Preskaŭ sekura, kiel ludilo kartona,
radianta kaj pura - bombo neŭtrona.

Nu simple ŝutiĝas manao ĉiela.
Ĝi estas humana, eĉ miela:
Restos salonoj, portaloj kaj parkoj,
loĝejaj kvartaloj, stacioj kaj arkoj.

Restos grenkampoj kaj golfoj, kaj valoj...
Sed homoj? Nu, tio ĉi estas detaloj,
La homoj? En nebulon ili sin transformas.
Kia koreco! Kian humanecon oni informas!

Ĉu vi aŭdas krakantan pledon senpardonan?
Jam denove oni reklamas la bombon neŭtronan.

tradukis: K. Istomin

daŭrigo kaj fino de la antaŭa paĝo :

Ekzistas nur unu problemo. Kiam oni volos altrudi esperanton, ĝi perdos sian potencon. La lingvo esperanto estas ekzemplo de demokratio. Esperanto ne estas ligita al lando aŭ nacio. Ne estas nacia esperanto, kaj tio signifas ke, kiam du homoj parolas, ambaŭ parolas fremdan lingvon, duan lingvon. Kiam mi parolas kun Brito, kaj mi sufiĉe kapablas la anglan, mi parolas fremdan lingvon kaj la aliulo ne. Do mi troviĝas en subpremita situacio, rilate lingvo. Ĉe serioza diskuto pli ol grava handikapo, mi supozas? Plia avantaĝo de esperanto estas la propedeŭtika valoro, kiu ebligas pli facile lerni aliajn lingvojn.

Mi opinias ke la forumo de «alternativaj tutmondistoj» estu la fekunda grundo en kiu esperanto povas kreski. Politikaj penadoj kondukas ĉiam al devigo, al perdo de demokratia decidrajto. Tion almenaŭ instruas al mi la Bolonja deklaro.


Multkultura socio eblas nur kiam ekzistas respekto por diverseco de kulturoj, kutimoj kaj lingvoj. Esperanto estas la plej bona kaj demokratia alternativo por solvi ĉi tiun problemon.

Jakvo

SAT havas novan domajnadreson:

sat-esperanto.org

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,27 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :70 € + 9 € (reg. afranko).

Ni petas ĉiujn mendantojn iom pacienci ĉar ni ne estas nombraj en la oficejo kaj necesas iom da tempo por paki kaj ekspedi la menditajn librojn.

Novaliĝoj

35.554 Dominique Leroy, E 514 Av. du Maréchal Juin Morvan, FR-76420 Bihorel, Francio
35.555 *Dzoniĉ Vesna, Kursulina 13/II-18, YU-19000 Zajeĉar, Jugoslavio
35.556 *Filimonoviĉ Jovanka, Generala Gambete 2, YU-19000 Zajeĉar, Jugoslavio
35.557 *Milanoviĉ Svetlana, Hajduk-Veljkova 4/IV-4, YU-19000 Zajeĉar, Jugoslavio
35.558 *Milovanoviĉ Ljiljana, Naselje «Kraljevica» B-2/I-6, Yu-19000 Zajeĉar, Jugoslavio
35.559 *Kosobudzka Maria, ul. Grzeszczyka 6/27, PL-02-122 Warszawa, Pollando
35.560 Amerio Francesco, Via della Consolata 1 bis, IT-10121 Torino-TO, Italio
35.561 Barbero Simone, V. Boston 130, IT-10137 Torino-TO, Italio
35.562 *Cavalier Yolande, 20 rue Saint Martin, FR-02290 Morsain, Francio
35.563 Adeline Philippe, 24 rue Alphonse Duchesne, FR-95110 Sannois, Francio
35.564 Chapman Hilary, 8 Vardre View, Deganwy, Conwy, LL31 9TE, Britio
35.565 Todor Rodica-Anisoara, B-dul Valea Cetatii n° 22, bl.B 24 sc. A. Ap. 5, RO-2200 Braŝov, Rumanio
35.566 Neves de Miranda Clavius Vinicius, Av. Augusto de Lima, 196-apto.301, BR-30190-001 Belo Horizonte, MG, Brazilio
35.567 Glossop Ronald J., 8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136, Usono

Viaj reagoj....

MI MIRAS

Leginte la artikolon de Jacqueline Lépeix (sur la lasta paĝo de la gazeto), mi miras! Ĉu Ĵakelina vere opinias ke "francaj moroj" malhelpos seksperforton? Ĉu ŝi vere kredas ke nur fremduloj, kiuj ne lernis la "francajn morojn" seksperfortas? Mi estas anino de feminista (sed ne seksista) asocio "Rien Sans Elle" (Nenio Sen "Ŝi") kaj ni bone scias ke viroj kiuj kulpas pri seksperforto estas ĝenerale (en siaj landoj) ordinaraj edzoj, patroj, filoj, eĉ kun "kulturo de kristandevena principo". Ĉu oni devus ekzili ilin.... sur la lunon?
Mi timas ke, se ni serĉos virojn, kiuj ne vere konsideras virinojn kiel konsumaĵojn aŭ almenaŭ kiel stultajn kokinojn (kiujn ili devas obeigi!) - ni ne trovos multajn! Do, ni devas batali por ke ĉiuj virinoj en la tuta mondo ĝuu la "homajn rajtojn"(ĉu en Francio, Turkio, Afganio, Japanio ktp).
Ŝajnas al mi ke viroj komprenis nur "virajn rajtojn".

Marthe Poher

PRI ORFAĴOJ

Samkiel ekzistas orfaj malsanoj, ĉar serĉado de ties kuracrimedoj ne estas finance profitodona, ekzistas ankaŭ homaj orfaj problemoj kiujn eĥas neniu el kutime aktivaj asocioj kaj tiel, estas rapide metitaj flanken, dum kelkaj temoj senĉese revenadas en la lumrondon. Ja ankaŭ informoj estas "varo" kiu dependas de merkataj leĝoj, de politikaj interesoj, de ideologiaj celoj ..

Ŝajnas ke S'ulo obeas tiun leĝon, ne laŭ ekonomiaj kriterioj kompreneble, sed per entrudiĝo de ideologiaj dogmoj tiel ke, tute prokraste, ĝi obeeme reeĥadas tion kion ĉiu el ni pli abunde kaj de jam longe ĝissatege konas tra la amasinformilaro. Nia modesta monata gazeto ne taŭgas por ludi tian rolon. Ĉi-tiu estas tute alia, i.a., senvualigi trompinformojn kaj elfosigi homajn problemojn kiujn orkestritaj kampanjoj preterlasas. Nia gazeto estu pioniro, ne remorko.

Dum la dekok pasintaj monatoj, nia bulteno pritraktadis Israel-Palestinan problemon, foje ruze envolvita en artikolon kies titolo trompe anoncas tute alian temon. Tio pruvas ke ankaŭ nia ŝatata gazeteto ne estas ŝirmata kontraŭ ideologiaj entrudoj.

Intertempe, ĝenerala informilaro tre malofte raportas pri skandaloj kaj tragedioj kia la perforta koloniigado de Tibeto, kies popolo, dum la ekinvado sub gvidado de Kdo Granda Stiristo Maŭ Zedong, superis duoble la nombron da palestinaj Araboj en 1948. Kvazaŭ ne ekzistus tibeta identeco kaj kulturo, nek rajto je propra ŝtato "en universale akceptitaj landlimoj". Tibeto estas nur senpersoneca vastega koloniigota "teritorio" kien ĉina ŝtato seninterompe enmigrigas Hanojn, kies nombro verŝajne superas nun tiun de Tibetanoj. Kiom da fuĝintoj, da ekzilitoj, da enkarcerigitoj, da mortigitoj, da "translokigitoj" ? Neniu kapablas respondi. Kial okcidentaj "volontuloj", kiuj kortuŝe kaj spektakle sin montradas al televidkameraoj flanke de Arafat en ŝanceliĝema kandellumeto, ne same vizitas Tibeton akompanate de televidkameraoj ?

Kiu, krom du el niaj kamaradoj, ambaŭ samcivitanoj de Ĉi-Rejnia respubliko, raportis pri tia invado per vortoj kiaj :"koloniigo, koloniistoj, "okupita teritorio", "etna purigado"? Ambaŭ ja indignas pri « iom-post-ioma instalado de kolonioj « sed releginte ilin, mi konstatas ke temas ne pri Tibeto sed pri « Ĉi-Jordanio « . Kaj Ĉi-Rejnia prezidento Ŝirak, kiu pompe akceptas Jaser Arafat'on en sian prezidentan palacon, ne trovis pli da tempo ol sia tiama socialista ĉefministro, nek pli ol la stentoroj de porpalestina afero, por renkonti, eĉ diskrete Dalai- Lamaon en Parizo.

Estas vere ke ĉi lastan, neniu vidis milit'uniforme vestita kun pistolo ĉe zono; neniam ordonis li "ĝihadon", nocio verŝajne ne tradukebla en tibetan lingvon. Alivorte, se Tibeto estus memstara, ĝi mendus nek nukleajn ekipilojn, nek aviadilojn, nek maŝinojn, nek tankojn, nek submarŝipojn (eĉ ne maran havenon ĝi havas) nek ingrediencojn por kemia, nuklea aŭ bakteria armilaro. Plie, Tibeto eĉ ne havas "fratlandaron" por ĝin subteni ĉe internaciaj instancoj kaj ĝin provizi per militrimedoj. Jen perfekta orfaĵo. Kial do kolerigi Ĉinion kaj fuŝi profitdonan merkaton pro sensignifa amikeca gesto al ne-oportuna gasto ? Ĉu gravas ke la dezirindaj klientoj ne estas tre respektemaj rilate al homaj rajtoj ?

Ĉar nia asocio estas laŭstatute klasbatala, pro kio Tibetanoj interesus nin ? Ĉia malama sento, ĉia uzo de perforto kaj de murdoj estas fremda al Tibeta kultura kaj religia tradicioj. Kiu aŭdis ion pri tibeta terorismo, ĉu kamikaza ĉu "ordinara", pri aer-piratado, pri kaptado kaj murdo de ostaĝoj fare de Tibetaj "rezistantoj" ? Tiaj homoj, kiuj eĉ ne "armilojn de malriĉuloj" uzas estas ne varbeblaj de « revoluciaj « agitadistoj; ili meritas nek solidarsenton nek intereson.

Pli malbonŝance, la invadinto estas nek Usono nek Israelo sed marksista ŝtato kies iama estro Maŭ-Zedong, Granda Stiristo, varbadis, kiel sia humanista samideano Pol Pot, tiom da adeptoj ĉe tutmondaj radikal'maldekstruloj

Ni apenaŭ ekscias pri aliaj «orfaĵoj" tiaj kiaj Papuoj en kies Irianĝaja teritorio (iama Novgineo) kie Javio anstataŭis iaman nederlandan koloni'potencon, kaj pli kaj pli forpuŝas ilin el iliaj hejmlokoj profite al Javanoj. Sed neniu pretendos ke Indonezio estas koloniista ŝtato kaj nomus ties fi-agojn «etna purigado» aŭ "koloniigo". Plie, kvankam tiu iam koloniigita ŝtato ekstermis dum la pasinta jardeko pli ol ducentmil Timoranojn (unu kvinonon de tiu popoleto) , neniam niaj kutime viglemaj bonkoruloj uzis vortojn kiaj "genocido" aŭ "etna purigado". Ankaŭ ni ne tro multe aŭdas pri « laika» Sirio, aminda ŝtato kie unu el niaj kamaradoj kiu, en alia cirkonstanco, senbremse protestas kontraŭ etna purigado, senmire konstatis surloke, kvazaŭ tio estus sensignifa banalaĵo, ke «neniu Judo estas tie videbla». Dum la germana Tria Regno oni uzus adjektivon "judenrein"= pura per senjudigo.

Tiuj ekzemploj inter tiom da aliaj, kiuj koncernas homojn po dekmilione, ŝajne emociigas neniun aŭ nur efemere, ne pli ol la sorto de Latinamerikaj kamparanoj po dekmile prirabitaj kaj buĉitaj de diversaj narkotmarksistaj aŭ kontraŭmarksistaj geriloj. Ĉu necesas ankaŭ memorigi nenombreblajn pereintojn en Afriko, viktimoj, tiom de lokaj militoj interne de landoj kies "landlimoj estas universale akceptitaj" , kiom de senhonta ŝtelemo de tieaj regantaj klasoj ?

Neniu tion ignoras sed tio ne okazigas tiujn seninterrompajn kampanjojn kaj amasprotestojn konstateblajn kiel kiam io koncernas palestinan aferon. Kial ?

Alia orfa tragedio estas tiu de mortpuno.

Ja multaj ne-ŝtataj-organizoj luktas kontraŭ tiu arkaika barbaraĵo. S'ulo tion pritraktadas. Nia kultura jargazeto Sennacieca Revuo de 2000/2001 eĉ dediĉis du plenajn paĝojn por kondamni mortpunon .....en Usono, kie kulpas, laŭ la erudicia redaktoro ...Biblio (!). Ĉu necesas rememorigi ke kiam Hamurabio, kiu influis la verkiston de koncerna biblia parteto, leĝigis mortpunon en Mezopotamio, Biblio eĉ ne estis ankoraŭ ekverkita. Alitempe kaj aliloke, tiuj kiuj en Ateno mortkondamnis Sokraton per ensorbo de cikuto, dubinde legis Biblion kies Septanta ektraduko en grekan lingvon okazis pli ol jarcenton poste. La aŭtoro de la koncerna artikolo tamen plenigas kvindek liniojn por pritrakti Biblion, kvindekok por pritrakti mortpunon en Usono sed duona linio sufiĉas al li por "objektive" memorigi ke

mortpuno "ankaŭ estas permesita...en diversaj afrikaj kaj aziaj ŝtatoj". Mortpuno en tiuj "diversaj landoj" estas bagatelaĵo kiu ne valoras pli da atento..

Tial, por kompletigi la menciitan artikolon, mi aldonas ke tiuj "diversaj landoj" tamen konsistigas 99 procentojn de Azio, inklude Indonezion kaj Rusan federacion. Nur Kamboĝo, Nepalo, Kazakstano kaj Israelo ne leĝigis mortpunon. Siaflanke, kun escepto de Angolo, Namibio, Sudafriko kaj Mozambiko, mortopuno estas laŭleĝa sur la tuta afrika kontinento inklude Madagaskaron.

Inter tiuj "kelkaj landoj", tri aŭ kvar ekzekutis en la jaro 2000, laŭ Amnestio Internacia, pli da kondamnitoj ol Usono, nome Ĉinio kun pli ol 1000 ekzekutoj estas nekontestebla ĉampiono, sekvate de Irako ("kelkaj" centoj), Saŭdarabio (oficiale 123), Irano (oficiale 75, sed certe pli). Usono staras "modeste" nur je la kvara aŭ pli verŝajne je la kvina vico, sed tion, homo kiu ŝuldus sian kulturon nur al S. R., neniam scios. Neniun ciferon mi konas pri norda kaj suda Koreo, Vietnamo, Sirio, Egiptio, Pakistano, Nigerio, Sudano, "Palestina Aŭtoritato" ktp. Plie : dum Usono kondamnas nur supozitajn murdistojn al kiuj eblas prokrastigi multjare sian ekzekuton, kelkaj el aliaj menciitaj ŝtatoj senprokraste murdas ankaŭ pro politikaj aŭ religiaj deliktoj. Ĉilastaj ne mankas : opozicio al ŝtato aŭ religio, adulto (ĉefe fare de virino en poligamia sistemo), kanone malpermesata seksrilato, samseksa rilato, herezo, blasfemo, apostato, ktp. Por malpli gravaj deliktoj, dank'al pardonema Alaho, oni "nur" kripligas la pekanton. Malofte televido montras tiujn hororaĵojn. Neniu kampanjo, neniu manifestacio kontraŭ tiuj barbaraj kutimoj estas konstateblaj, neniu protesto fare de niaj homrajtaj asocioj perturbas urban trafikon, sed ĉiuj kampanjoj kontraŭ mortpuno fokusas nur kontraŭ Usono (85 ekzekutoj en jaro 2000). La ekzekutoj en "diversaj afrikaj kaj aziaj ŝtatoj", multe pli nombraj, restas orfaĵoj ekster lumrondo de nia konscienco.

Karaj kamaradoj, permesu konsilon : se vi iam devus esti kondamnita je mortpuno kaj deziras ke tio okazigu bruon en la mondo, prefere elektu Usonon.

Sed absoluta orfaĵo estas mortpuno decidita de krimecaj, oficiale "neŝtataj" organizoj kiuj amasmurdas virojn, virinojn, infanojn, kripligas centojn de aliaj pro la nura kulpo ke ili troviĝas sur la vojo de kondiĉitaj fanatikuloj. Tiuj buĉadoj de senkulpuloj, kiujn Amnestio Internacia ne kondamnas ĉar nur ŝtatoj interesas tiun respektindan homrajtan organizon, trafas almenaŭ "komprenemon", ofte aprobon, foje aktivan subtenon de multaj homoj, kutime malamikoj de mortopuno, kiuj konsideras terorismon kiel "armilojn de malriĉuloj".

Kvankam en jam longa vivo ne mankis al mi okazoj por esti mortigita, mi ne sufiĉe spertis mian propran morton por prijuĝi ĉu morti per armilo de "malriĉuloj" estas politike pli korekta kaj pli ŝatinda ol per tiu de "riĉuloj".

Tiu "komprenemo" rezultas el absoluta mistifikado kiam ni scias ke la plej efika rimedo por sufokigi tiun "militon de malriĉuloj" konsistus el drastega kontrolado de kapitalmovoj el islamistaj teror'ŝtatoj kaj "neŝtataj" organizoj tra monda retaro kamuflita sub respektindaj ŝildoj de humanistaj, kulturaj, bonfaraj, karitataj organizoj. Sed progresema, kiel kristana mitaro, konsideras "malriĉecon" kiel memsufiĉan virton.

Mi ne estas informata pri la kosto de la nombraj islamistaj retaroj kiuj polucie svarmas en Eŭropo, Usono, Alĝerio, Proksimoriento, kaj aliaj partoj de la mondo, sed ĝi certe sufiĉus por dece loĝigi ĉiujn arabajn senhejmulojn je kies nomo tiuj terororganizoj pretendas agi, konstrui kaj funkciigi universitatojn kaj profesiajn lernejojn por egalece instrui junulojn kaj junulinojn, antaŭa fundamenta rimedo por lukti kontraŭ senlaboreco kaj sinsekva mizero kiu, pli ol militoj kaj etnaj purigadoj, forpelas el siaj hejmoj tiom da Araboj por enmigri, plej ofte malleĝe kaj riskeme, en pli kaj pli negasteman Eŭropon.

En Alĝerio, kies landlimoj estas universale akceptitaj, ĉu estas "malriĉuloj" tiuj kiuj preskaŭ ĉiutage, senkompate ĵetas bombon meze de homamasoj, pie tranĉas la gorĝon de centoj da virinoj, infanoj kaj senarmaj kamparanoj kaj, rekompensate de Alaho, perfortas virinojn ? Ni rimarku ke la gazetaro raportas pri tieaj buĉadoj nur per kelkaj linioj, kvazaŭ temus pri ordinara diversaĵo, kvankam la nombro da viktimoj superas tiun de adiciitaj Israelaj kaj Palestinaj viktimoj. Dume, ĉiu palestina terorago kaj ties neevitebla israeala rebato plenigas plurajn paĝojn per komentoj, analizoj kaj polemikoj. Alĝeriaj viktimoj de islama terorismo apartenas al la orfaĵa kategorio, kvankam ties murdistoj, kiel la palestinaj, kiel la pakistanaj, kiel la retaro kiu famiĝis en Novjorko, eliras el la sama "etika" ideologia kaj sendube financa barelo.

La "borsokurzo " de homa vivo varias laŭ ideologiaj faktoroj

La kvardeko da armitaj palestinanoj kiuj pereis dum la urba batalo de Ĝenino okazigadis en niaj "Okcidentaj" urboj bruajn amas'manifestaciojn en kiuj enŝoviĝis antisemitaj sloganoj, dum la Novjorkaj pomilaj viktimoj, oficistoj, puriglaboristoj, kies horora morto eĉ ĝojigis malamantojn de Usono, inter kiuj multaj cetere kontraŭstaras mortopunon, jam staras ekster la lumrondo de ĝenerala informilaro. Ni eĉ vidis ĝoj' manifestaciojn en arabaj urboj sed, krom oficialajn kondolencojn kaj kinecan Jaser Arafatan sangdonacon, neniun amasmanifestacion ni vidis kontraŭ tiu monstraĵo.

Denove mi riskas konsilon : se vi ie devus esti viktimo de terorismo, evitu Alĝerion, eĉ Usonon, elektu prefere Israelon aŭ Palestinon. Sur la informila merkato, via kadavro, prefere diseksplodigita, tie valoros multe pli ol en alia loko.

Tion dirite, temas ne pri armiloj de malriĉuloj sed male, kontraŭ malriĉuloj, je la servo de " ĉiam fekunda ventro de la abomeninda Besto" kies idaro nomiĝis Inkvizicio, Stalin, Hitler, Pol-Pot, Ruĝaj armitaj Brigadoj, kaj nun Radikal-Islamfaŝismoj. Tionrilate, ne ekzistas diferenco inter religiaj, dekstraj aŭ maldekstraj radikalismoj. Iliaj metodoj kaj propagandilaro ĉerpas el sama fonto: malrespekto de homa vivo, de libereco, flatemo al plej bestecaj sentoj de homamasoj, antisemitismo; ĉi lasta estas ilia konstanta komuna denominatoro.

Ankaŭ ne temas pri milito inter du "kulturoj" kiam la viktimoj de tiuj ideologiaj piaj buĉadoj estas ankaŭ arabaj, samkiel, inter 1933 k.1945, krom la milionoj da homaj estaĵoj buĉitaj fare de la SS-ŝtato, ankaŭ milionoj da Germanoj pereis en uniformo aŭ civile hejme sub bombardadoj, en koncentrejoj, kaj ĉirkaŭ dudek-milionoj pliaj estis forpelitaj de finvenkintaj Sovetio, Polio kaj Ĉekio. Same japana popolo multege pagis la frenezecon de siaj politikuloj .

Totalismo kaj ĉiukolora faŝismo estas ogroj kiuj fine voras siajn proprajn infanojn.

Terorismo similas atoman polucion : ĝin "landlimo universale akceptata kaj kontrolata ambaŭflanke" neniel haltigas. Tion, post Israelo aŭ Alĝerio, spertis Usono la 11an de septembro 2001. Tio signifas ke neniun politikan solvon ni povas esperi tiom longe kiom oni ne unue elradikigos ĉiujn terorretarojn, iliajn financistojn kaj edukantojn.

Sed kiel ekspliki tiun "orfaĵaron" kun konsekvenca kristaligo sur unu solan viktimon kaj unu solan kulpulon ?

Mi kredas ke respondon ni devus serĉi ne en politiko aŭ sociologio sed en psikologio. Butikdekoristo iam diris al mi ke kiam li ordigas montrofenestron, li ne montras ĉiujn vendotajn varojn sed nur unu aŭ du modelojn kiuj "kristaligas" ĉiun aliajn disponeblajn modelojn. Tio pli bone kaptas la atenton de celitaj klientoj. Tiu reklamista lertaĵo ĉerpas el prahistoria sper-

to de la homaro kiu spontane "kristaligis" siajn zorgojn, timojn aŭ esperojn en idolojn, totemojn kaj diversajn simbolojn prezentitajn per signoj, objektoj, bestoj aŭ homoj.

En la kristanaj regionoj, per reciproka interinfluo inter homamasaj antaŭjuĝoj kaj klerikaraj interesoj, la Judo pli kaj pli simbolis absolutan malbonon kaj kristaligis ĉion pri kio popolo suferis aŭ timis : malsategoj, pesto, militoj, trompo, ruzo enkorpiĝis en la Judon. Ĉi-tiu restis malicefika eĉ ĉe popoloj meze de kiuj ne restis Judoj depost pluraj generacioj. Oni povus aserti ke kristana religio kulpas en tiu malamikeca prezento de Judo. Sed kiam vekiĝis naciismo, la nacia mito, kiu anstataŭis apartensenton al sama eklezio, ne toleris Judojn pro ties "fremdeco" kaj ĉi lastaj denove "kristaligis"ĉiujn krizojn naskitajn de la industriiĝantaj landoj (senlaboreco, ruiniĝo de mezaj klasoj, elradikiĝo de senlaboraj kamparanoj, tuberkulozo, disfaligo de religiaj sentoj, klasbatalemo, militoj, ktp). En tiu framo ekaperis pseŭdoscienca neologismo: "antisemitismo" kiu celis pruvi ke juda "raso" kristaligas ĉion pro kio popolo suferas, do ke necesas senjudigi la landon por ke ĉio funkciu glate. Kvankam Anatole France (mi kredas) asertis ke "antisemitismo estas la socialismo de imbeciloj", ni devas konstati ke ĉi-lastaj estis sufiĉe multenombraj kaj influaj se ni juĝas laŭ la paroksisma efikeco kiu kondukis al "finsolvo" de juda "problemo" dum la germania Tria Regno

Sed kredinde, homoj funkcias ne laŭ propra prijuĝo sed laŭ transricevitaj antaŭjuĝoj kiuj sin apogas sur simboloj kaj tio estas konstatebla eĉ en S'ulo en kiu ni povis legi, pasintjare, ke "Cionismo kristaligas ĉiujn politikajn fenomenojn kiujn la 20a jarcento travivis". (Sekvas longa listo en kiu mankas nur prociono kaj aideso). Krom la oportuna vorto "cionismo", la tuta frazo, pri kiu mi nur proksimume memoras, povus esti fidela transskribo de "klasika" antisemita argumentaro.

En tiu komenciĝanta jarcento kaj jarmilo, Judo, tra sia Israela ŝtato, sed ankaŭ tra "biblie judigita Usono", restas ideala kristaliganto de ĉiuj krizoj kaj malfeliĉoj naskitaj de monda rapidega mutacio. Hazarde mi rete konektiĝis kun "Radio Islam" - legebla en dudeko da lingvoj - kiu elrubujigas ĉiujn mezepokajn, Hitleristajn kaj negaciistajn argumentojn, cele al "liberigo de Okcidento de la judokracio". Do ne temas nur pri Israela ŝtato kiu utilas nur kiel preteksto. Atentu ! Mi scias ke, feliĉe, tiu radikala tendenco ne respeguligas opinion de ĉiuj Muzulmanoj inter kiuj multenombraj estas ties viktimoj, sed ĝi estas signifoplena kiam ni konstatas ke tiu islamismo, preter la longdaŭra politiko de Arafat kaj preter la provizora estrado de Ŝaron, estas la ĉefa aktiva obstaklo stariĝinta sur la vojo de paca solvo en Proksimoriento.

Mi konsentas ke kritiko de Israela ŝtato, (tion israelanoj ankaŭ tutlibere faras) ne devige respeguligas antisemitismon, sed en nia moderna civilizacio kiu forgesis la potencan efikon de simboloj, la problemo ne troviĝas en bonaj aŭ malbonaj polikaj decidoj sed en kristaligo de la Malbono en Usonon kaj Israelon, kies komuna simbola valoro estas, laŭ iliaj kontraŭuloj, la Biblio, kaj Bono (Tria Mondo, marksistaj kaj maldekstre radikalaj organizoj, iamaj kolonioj) kies trudiĝanta simbolo pli kaj pli estas la Korano.

Tial sufiĉas, kiel tion faras mia butik'dekoristo pri ŝuoj aŭ aliaj varoj, fokusi sur Israelon kaj Usonon por ekspliki ĉion kio misfunkcias en la mondo.

Tiel mi komprenas Jaser Arafaton, muzulmano kiu, obstine trudiĝante en kristanajn preĝejajn ceremoniojn, identigas la Palestinanojn kun Jesu-Kristo, tiu "palestinano" kiu kristaligas ĉiujn suferojn de la homaro, viktimo de malicefikaj Judoj kiuj kristaligas ĉiujn perfidojn kaj krimojn kontraŭ la homaro.

Ĉiuj aliaj suferantaj homoj falas en la ombran orfaĵaron. Tio samtempe absolvas la respondeculojn de ties suferoj.

David Dawidowicz
SATaniĝis en 1940

Virinaj kapkoltukoj

Ĉi-tio okazis en Hispanio, sed povus okazi kaj okazas en ĉiu lando de Okcidenta Eŭropo. Temas ne nur pri kultura misrenkonto, sed ankaŭ pri situacio de virinoj kaj pri sistemo de lernado. En vilaĝo apud ĉefurbo Madrido privata lernejo malakceptis marokanan knabinon kiu poste estis denove malakceptita de ŝtata lernejo pro falskialo, ke ŝi uzas araban kapkoltukon. La dekstrula nacia registaro apogis la lernejan estraron pro tio, ke tiuj tukoj estas kulturaj subpremoj kontraŭ virinoj. Tamen la regiona registaro, kiu finfine decidis, devigis la ŝtatan lernejon akcepti la knabinon eĉ kun tuko.

Tiu okazaĵo igis gravan polemikon tra la tuta lando: homoj favoris aŭ malfavoris liberecon uzi tiujn arabajn tukojn. Kultura miskompreno kaj malkompreno multiĝis. Ekzemple tiuj, kiuj malfavoris uzadon de tukoj eĉ pro kialo de libereco de uzontinoj ne uzi ilin, forgesis la fakton, ke en Hispanio, kaj ĉefe en kamparanaj regionoj, virinoj uzis ilin kutime almenaŭ ĝis la sesdekaj jaroj kaj eĉ nuntempe multaj junulinoj daŭre uzas ilin. Tiuj forgesis ankaŭ la fakton, ke ankaŭ nearabaj familioj devigas aŭ malpermesas al siaj knabinoj iujn eblecojn. Pro tio ĉiu devas klopodi kaj strebi malpermesi ĉiujn malpermesontojn, ne nur la fremdajn.

La lasta ĉapitro temas, ke la patro de la filino petas, ke lia filino estu akceptita en la unua lernejo kie ŝi estis malakceptita, pro tio, ke se estas devigo por ŝtata lernejo akcepti ŝin, estus devigo ankaŭ por privata lernejo, ĉar en Hispanio tiuj privataj lernejoj ricevas monon de la ŝtato kontraŭ deviga regularo. Tamen la regiona dekstrula registaro devigis la ŝtatan lernejon je akcepto, sed ne la privatan lernejon.

Krome ĵurnalistoj, kiuj vivigis la polemikon, nenion diris pri la fakto, ke tiu privata lernejo estas posedata de monaĥinoj, kiuj ĉiam kaj daŭre uzas pli grandajn kapkoltukojn ol la arabaj, kaj ke nenia registo parolis pri malpermeso de tiuj tukoj, kvankam nur virinoj portas ilin kaj pro la samaj kialoj kiel la arabaj virinoj, religiemo kaj kaŝo de allogeco.

Jozefo Saliko

NEKROLOGO

Laŭ la poŝta informo, ĵus mortis en Bordeaux (FR) 72-jara, nia k-ino

Ginette GABILLON
(matr. 35.249)

Ni kondolencas al familianoj.

****

En Chalons en Champagne (FR) mortis 65jara nia k-do

Michel HAREN
(matr. 32.304)

Ni kondolencas al la familianoj;

****

Tra nia kamarado Bues ni eksciis pri la morto de nia malnova membro, kamarado

August REDECKE
(matr.24.284)


Ni kondolencas al liaj filoj kaj geamikoj.

****

Ni ĵus eksciis pri la morto en Cavaillon (FR), en aĝo de 88 jaroj, de nia malnova fidela membro, k-do

Georges CLAUZADE
(matr. 21.509)

Nia kamarado aktive kunlaboris en la lasta eldono de PIV, sed bedaŭrinde ne ĝisvivis ĝian aperon. Ni kondolencas al la familianoj kaj geamikoj.

S.A.T.  ERINACO

Distra paĝo por seriozaj SAT-anoj

ENIGMO

Ĉeestantaj kongresanoj		Petro	Johano	Natalia	Roberto	Anna
Loĝurbo	BERLINO					
	PRAGO					
	ROMO					
	PARIZO					
	LONDONO					
Ŝatokupo	Filatelo					
	turismo					
	alpismo					
	ŝakludo					
	spiritismo					
Naskiĝjaro	1965					
	1971					
	1974					
	1976					
	1982					

Dum la interkona vespero okaze de iu el la regulaj SAT-kongresoj, ĉirkaŭ la tablo sidis kaj dank'al Esperanto tre facile babilis Petro, Johano, Natalia, Roberto kaj Anna. Montriĝis ke ili ĉiuj vivas en diversaj urboj en Eŭropo, ne naskiĝis en la sama jaro, kaj havas tute malsamajn ŝatokupojn. Helpe de la subaj nekompletaj notoj faritaj de unu el ili oni tamen povas diveni la loĝlokon, la ŝatokupon kaj la naskiĝjaron de ĉiuj gekamaradoj. Indas klopodi trovi la solvojn. Dum la solvado oni uzu simplan krajonon, kaj por jesaj kaj neaj asertoj en ĉiujn kvadratojn enigu la signojn «+» kaj «-».

- Petro, kiu vivas en la urbo de la SAT-oficejo, estas pli aĝa ol Natalia. Li ne ŝatas kolekti poŝtmarkojn.

- Anna, kiu naskiĝis 50 jarojn post la fondiĝo de SAT, tre ŝatas ekskursojn.

- Roberto, kiu preferas surgrimpi la altajn montojn, estas la plej juna. Li ne vivas en Italio.

- La plej aĝa persono, kiu vivas en la urbo de la fondkunveno de SAT, insistas pri ebloj interrilati estulojn de la nevidebla mondo.

- La pli juna virino vivas en Britio.

I. Moĉilnik



NI RIDU

- Kia estas diferenco inter Windows kaj la senplumba benzino ?
- La senplumba 98 estas pli bona ol senplumba 95.

***

- Kiel oni diras angle : «Mia bopatrino ne venos manĝi hodiaŭ vespere»?
- Yes !

***

- Kia estas diferenco inter EKSCITI kaj NERVIGI ?
- Antaŭ ses jaroj ŝi ekscitis min kaj nun ŝi nervigas min.

***

- Kiom da irlandanoj necesas por ŝanĝi unu ampolon?
- 16. Unu por teni la ampolon kaj aliaj trinkas viskion ĝis la ĉambro komencas turniĝi.

***

- Kio estas: «Havi kuraĝon»?
- Havi timon, sen ke aliaj tion rimarku.

***

- Kia estas diferenco inter edzino kaj amantino ?
- La diferenco estas tago kaj nokto...

***

- Kio estas la ina formo de «Direktoro» ?
- Sekretariino.

***

- Ĉu vi scias kia estas la puno por la bigamio?
- Du bopatrinoj.

***

- Kial la pastroj estas kontraŭ la amo antaŭ la geedziĝo?
- Ĉar tio prokrastas la geedziĝan ceremonion.